- Adresse :
- C.P. Ville :
- Téléphone :
- Profession :
- Voix : Soprano Alto Ténor Basse
- Je réserve :chambre(s) avec lit à 2 places
.....lits 1 place en chambre à 2-4 lits

TARIFS (sans hébergement)

Inscriptions	jusqu'au 15. I. 1997	après le 15. I. 1997
<15 ans ou 3e d'une famille participante	160,00 FFs	240,00 FFs
de 15 à 26 ans ou 2e d'une même famille	240,00 FFs	320,00 FFs
> 26 ans	320,00 FFs	400,00 FFs

Règlement à l'ordre de : C.E.E.A. CCP 2579 34 E TOULOUSE

Je verse FFs d'inscription
..... FFs d'arrhes (minimum 500FF) pour
les repas et l'hébergement (comptez max. 1200 FF)
SIGNATURE :
(obligatoire)

En cas de déstagement (jusqu'au 31 février) seuls les prix des repas sont remboursés

52-A SAT-AMIKARA KONGRESO



La 52a Kongreso de Sat-Amikaro okazos en Limoges
(Haute-Vienne) de la 29a ĝis la 31a de Marto 97,
en kultura centro Jean Moulin lokita en nova kvarta-
-lo Beaubreuil norde de la urbo.

Informas Isabelle Jacob, Pomarbo, 87200 Saint-Brice,
Telefonnumero 05-55-03-54-76.


Samtempe kiel la 52a kongreso disvolviĝos "infana
kongreseto". La programo estas havebla de SFS.
Estas ankaŭ organizita konkurso de infandesegnaĵoj
(limdato de sendo : la 1a de marto) laŭ du temoj :
a) miloj da lingvoj kaj unu tero. Kiel fari? Kiel fratiĝi?
b) reklamo kiu allogas al la lernado kaj uzado de E°.
Petu la kompletan regularon !

Kvankam samdate disvolviĝos interesa E°-semajno en Germanio (vidu p. 9), ni rekomendas
al vi la kongreson de IFEF (Fervojistoj) en Košice - Slovakio, proksime de la hungara limo,
de la 10a ĝis la 17a de Majo. Ni renkontis la organizantojn dum lasta somero kaj povas
certigi, ke la programo estos tre alloga kun multaj vizitoj kaj ekskursoj.
En la landoj de orienta Eŭropo, kie la E°-movado pli frue prosperis, estas nun demandoj kaj
hezitemo, ĉar la ekonomia situacio antaŭenmetis novajn
prioritatojn. Niaj geamikoj en Orienta Eŭropo atendas
nian subtenon, ekzemple per partopreno en la tieaj E°-
arangoj.

D-ro E. Coffinet (Nice) proponas klubajn ĝemeliĝojn kun
grupoj el la tria mondo por "helpi fratece kaj efike sen
infanecigo nek humiligo, kun minimume da peza kaj senhuma-
-na burokratismo". Kial ne sendi legitajn E-gazetojn al
afrika klubo aŭ pagi abonon por ili?

Tutmondigo de Esperanto ankaŭ dependas de ni.

J.H.



sabate, 10/05/1997 - marde, 13/05/1997
ESPERANTA KULTURA FESTIVALO EN AALEN

marde, 13/5/1997 - vendrede, 16/5/1997
EŬROPA JUNULARA PARLAMENTO EN STUTTGART

vendrede, 16/5/1997 - lunde, 19/5/1997
EŬROP-UNIA ESPERANTO-KONGRESO EN STUTTGART

alta protektanto: Germana Prezidento Prof. D-ro Roman Herzog




Stuttgart atendas vin!

Eŭropa Esperanta-Kultura Semajno 1997 en Aalen / Stuttgart



**Aalen / Stuttgart
 10 - 19 majo 1997**



Esperanta Kultura Festivalo en Aalen

... celas ne nur al la Esperanta publiko, sed same al la plikonatigo de nia kulturo al la ekstero. Okazos tre diversaj prezentadoj de nia kulturo - kaj por Esperantistoj kaj por ne-Esperantistoj. Tiu ligo estas esenca ĉar ja oftas Esperantaj kulturaj aranĝoj, sed ilin ĉeestas ĉiam nur Esperantistoj. Ni volas prezenti esence esperantajn kulturajn samkiel la internacian kulturan diversecon kaj riĉecon pere de Esperanto. La aranĝo estas finance subtenata de la urbo Aalen.

Eŭropa Junulara Parlamento

paralele:
ekskursa programo en Stuttgart

La junuloj diskutos kun fakuloj kaj politikistoj (ne-Esperantistaj) en laborgrupoj, ellaboros proponojn por la politikistaro el la vidpunkto de junuloj el oriento kaj okcidento kaj prezentos tiujn rezultojn en formo de „parlamento“, kies debatojn povos sekvi la publiko. Por tiu aranĝo aperis aparta aliĝilo kaj dua bulteno.


**Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart
 16 - 19 majo 1997**

9 tagoj plenaj da informo, distreco, internacieco kaj Esperanto

... celas al nia movado, sed ankaŭ prezenti nian movadon al la ekstero. En la centro de la kongreso nek estos fakkunvenoj nek asociaj jarkunvenoj, sed diskutoj en la movado pri Eŭropa politiko ĝenerale kaj ankaŭ pri lingvopolitiko. Ni montru al la-ekstero, ke Esperantistoj sukcese praktikas transliman kunlaboron jam nun kaj do povas partopreni en la diskuto. Dum la kongreso okazos prelegoj pri Eŭropa politiko, laborrondoj pri la strategio kaj agado de la Esperanto-movado en EU, prezentoj pri la rezultoj de la du antaŭaj aranĝoj kaj kulturaj prezentoj.

.....
 Aalen kaj Stuttgart estas du urboj en la germana federacia lando Baden-Württemberg. Ĝi havas 9,3 milionojn da enloĝantoj sur 35 741 km² kaj situas en la sudokcidenta parto de Germanio, lime al Francio kaj Svisio. Kiel ĉiuj germanaj landoj ĝi havas propran konstitucion, parlamenton, registaron kaj ĉefurbon.
 La ĉefurbo de Baden-Württemberg estas Stuttgart, kiu havas 573.000 enloĝantojn. Ĝi situas en valo de la rivero Neckar, ĉirkaŭita de montoj kun vinbergardenoj. Stuttgart estas unu el la germanaj centroj de tekniko kaj kulturo. En la antaŭurbo Sindelfingen estas produktata la fama aŭto Mercedes, en la urbo troviĝas multe da diversaj muzeoj kaj galerioj.

.....
 Aalen situas ĉ. 70 km oriente de Stuttgart, rande de la montaro Alb (ŝvaba juraso) kaj lime al la federacia lando Bavario (Bayern). Aalen estis fondita de la Romianoj, ĝis 1803 ĝi estis libera urbo, rekte respondeca al la germana imperiestro. Kun 65 000 enloĝantoj Aalen estas mezgranda urbo, en ĉirkaŭo de kampoj kaj arbaroj. En la urbo situas la Germana Esperanto-Biblioteko kaj la urbo jam dum kelkaj jaroj kune kun FAME-fondajo transdonas la konatan Esperanto-Kulturpremion.



Haus der Wirtschaft la kongresejo en Stuttgart

**10
 11
 12
 13
 14
 15
 16
 17
 18
 19**
Stuttgart Aalen
 Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso Eŭropa Junulara Parlamento Esperanta Kultura Festivalo antaŭkongresaj ekskursoj

PROVIZORA PROGRAMO (nur elekto de programeroj)

sabato: ekspozicioj, libromarketo, pacludo, internacia bankulturo, vespere koncerto de Kajo
 dimaĉo: ekumena diservo, literaturaj prelegoj, kontraŭrasisma seminario, popolaj dancoj, pup teatro, Internet, diskuto pri internaciaj familioj, vespere teatro
 lundo: literatura promeno, prelegoj - i.a. Vieno: kulturponto inter okcidento kaj oriento, vespere: komuna grilroŝtado kaj koncerto de Jomart kaj Nataŝa el Kazahstano
 mardo: mallongaj programeroj, fermo de la festivalo, libera tempo en Aalen; transporto de partoprenantoj de la Eŭropa Junulara Parlamento al Stuttgart
 merkredo: tuttaga transporta ekskurso de Aalen al Stuttgart, ura Schwäbisch Hall, alveno en Stuttgart ĉ. 20.00 h.
 ĵaŭdo: tuttagaj ekskursoj al Tübingen/Hohenzollern, Heidelberg aŭ Nigra Arbaro
 vendredo: duontagaj ekskursoj, i.a. Ludwigsburg, Daimler-muzeo, ŝtata galerio, urboĝvidado; vespere: interkona vespero de la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso
 sabato: solena malfermo, prelega enkonduko en la strukturojn de Eŭropa Unio, prelegoj de fakuloj kaj poliŝtistoj kun diskutoj, fakgrupaj kunvenoj, ekskursoj; vespere: bufedo
 dimaĉo: podia diskuto pri "Edukado en pligrandiganta Eŭropo" kun poliŝtistoj, fakuloj kaj Esperantistoj, fakgrupoj, membrokunveno de naciaj asocioj, ekskursoj
 lundo: fina debato de la kongresaj rezultoj, solena fermo

Loĝado
 Bv. noti kiel forirdaton, la tagon de la lasta mateno, ne de la lasta tranokto. Ĉiuj prezoj estas en Germanaj Markoj por unu nokto kaj por unu persono kaj inkluzivas matenmanĝon.

en Aalen:

kategorio	1-lita ĉambro	loko en 2-lita ĉambro
1	145	105
2a/2b	80	61
3a/3b	52	47

junulargastejo: junuloj ĝis 26 jaroj 20 GM, aliaj 25 GM

en Stuttgart:




hotelo	1-lita ĉ.	loko en 2-lita ĉ.	loko en 3-lita ĉ.
01 Inter-Continental		140	
02 Im Schloßgarten	200	120	
03 Maritim	190	120	
04 Unger	180	115	
05 Ketterer	145	102	
06 Kronen	95	90	
07 Royal	110	85	
08 Hotel Wartburg	110	85	
09 Hansa-Hotel	80	65	
10 IB-Gästehaus	75	57	
11 Alte Mira/Museumstube			
kun duŝo en la ĉambro	75	65	60
sen duŝo en la ĉambro	67	57	52
12 Comfort Inn	95	52	
13 Viva-Hotel	75	46	
14 Junulargastejo (nur 12-16 majo)	28 GM		
15 Trampelpoint	junuloj ĝis 30	19 GM, aliaj 24 GM	

Junuloj aktivas... kaj invitas.


Post sukcesa ĉokolada semajnfino, fromaĝa semajnfino en Grenoble (4-6 Aprilo), ĉokolada internacia seminario (Claveyson en Septembro), kaj fiŝa semajnfino en Montpellier en Marto 98

FROMAĜO

Ni gustumados diversajn fromaĝojn aranĝitajn laŭ diversaj manieroj. Kiajn rilatojn havas la receptoj kun la regionaj kutimoj? Kiun gravecon havas la fromaĝo en la regionaj receptaroj? Ni jam prizorgas aranĝadon de la venontaj gas tronomiaj semajnfinoj. Kiujn temojn ŝatas la frandemuloj? Kie kaj kiam okazigi tiujn renkontuĝetojn? Ni pridiskutos la politikajn aspektojn de la tradiciaj fromaĝoj. Kiel politikaj decidoj efikas sur aperon aŭ malaperon de fromaĝoj?



For l'Enuo,
Sen Tema Optimismo!



Ĉu vi neniam revis sunumadi dum unu semajno marborde, en la "Côte d'Azur" en suda Francio?

Internacia junulara renkontiĝo
Saint-Raphaël - Francio
1 - 7 Aŭgusto 1997

Kaj des pli se estus en esperanta etoso?
Kaj se plie estus en Aŭgusto?
Tuj post IJK? Apud Italio?
Kaj malmultekoste konsiderante, ke temas pri valora turisma regiono?
Kun multaj surprizoj???

La mediteranea maro estas nur 20 minutojn piede kaj la eblecoj sportumi estas multaj: submara plonĝado, naĝado, veltabulo, sportaj padoj...


Por tiuj, kiuj preferas la naturon, la montaro "Esterel" estas tute apude: migradoj, biciklado...



Saint-Raphaël troviĝas en provenca regiono,

fama pro ĝia parfum-industrio, la gusto de ĝiaj tipaj manĝaĵoj, la bunteco de la arte- kaj manfaritaĵoj, kaj la ĉarmeco de ĝia kamparo kun multaj promeneblecoj.

FESTO, kiel la unua eldono en Lyon en Majo 96, plu estos sentema, sed vi povos daŭre kontribui per viaj propraj programeroj. Ne hezitu do!



JEFO proponas al vi konkretigi viajn revojn!!!

Dum unu semajno, ni invitas vin en Saint-Raphaël (Sankta

Rafaelo), vere marborde, 30 km de Saint-Tropez, 80 km de Nice, 120 km de la itala landlimo.

En dek-hektara parko kun pinoj, cikadoj, lavendo, rosmareno kaj olivarboj, vi tendumos agrable (aŭ, se vi preferas, vi povos loĝi en ĉambroj).



Kotiztabelo

Ĉiuj prezoj estas en francaj frankoj (FRF).

	tendumado	ĉambro	memzorgantaj
ĝis 31/01/97	850	1300	340
ĝis 31/05/97	970	1400	410
poste	1090	1500	480


Partoprenkondiĉoj:

- ◆ Tiuj prezoj inkluzivas por ĉiuj la loĝadon (6 tranoktoj) kaj la manĝadon (tri manĝoj en ĉiuj 6 tagoj) krom por memzorgantoj kiuj disponas nur pri loko por siaj tendoj. Oni liveros la manĝojn de la vespero de la 1-a ĝis tagmezo de la 7-a de Aŭgusto.
- ◆ La tendumantoj devas kunporti sian propran tendon, sed eblos loĝi sub komuna tendo kontraŭ surloka pago de 100 FRF por A-landanoj aŭ 50 FRF por B-landanoj. Kunportu vian dormosakon kaj matracon.
- ◆ La ĉambroj en la domoj estas du- aŭ trilitaj. Krome la nombro de litoj en tiuj ĉambroj estas limigita rezerve frue!

Detaloj haveblas de SFS.

7-a EŬROPA ESPERANTO-FORUMO

56-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO



7-a INTERNACIA ESPERANTO -KONGRESO

VALENCIA 8-13 julio 1997



Valencia, urbo kun preskaŭ unu miliono da loĝantoj, rande de la maro, dum multaj jaroj loko transpasata de ĉiaspecaj turistoj vojaĝantaj al la Blanka aŭ al la Suna Marbordoj, estas turisma allogo per si mem, kun alitro kiu ne estas limigita al la someraj monatoj. Ĝia Historia Centro donas la impreson de malnova urbo kun araba diagramo, en kiu estas interloktaj interesaj gotikaj monumentoj. La lago "Albufera" kaj la mediteranea arbaro la "Devesa" troviĝas inter la plej gravaj malsekaj areoj de Eŭropo, kun propra kaj tre interesa ekosistemo, kie la naturamantoj povas rigardi milojn da anseroj kaj aliajn naĝbirdojn, kiuj flugas dum siaj migroj, kaj ankaŭ povas ĝui ĝiajn belajn plaĝojn, posedantaj altkvalitan turisman infrastrukturon, kiu konsistas ekde kvinstelaj hoteloj ĝis grandaj kaj bone ekipitaj kampadejoj, sportaj instalaĵoj, kaj restoracioj kie eblas gustumi tipajn valenciajn manĝaĵojn.


Valencia estas ankaŭ sidejo de internaciaj foiroj kaj kongresoj, scenejo de tradiciaj festoj, kiel la tutmonde konata "Fallas", loko de renkonto de mediteraneaj kulturoj.

Valencia estas la urbo de la monumentoj gotikaj, renesancaj kaj barokaj en kiu vibras popolo agrikultura kaj industria kun spirito de plibonigo.

Valencia, mediteranea kaj eŭropa urbo, atendas la vizitantojn por pruvu ke la gastamo de ĝia popolo tras transen de la topikajoj.

Valencia estas la urbo kiu bonakceptas kaj ofertas la bonon de la milda klimato, la horizonton de la maro kvieta kaj luma, la fekundon de siaj ĝardenoj. Estas pli ol printempa vetero kiu odoras je oranĝfloroj.

Valencia estas la urbo kie okazis la 78-a Universala Kongreso de Esperanto, rute ne forgesibla.



Kaj Valencia estas multe plii.



DUMKONGRESAJ EKSKURSOJ



DUONTAGAJ: D1.- HISTORIA VALENCIO.. 1.000 pta D2.- LAGO ALBUFERA KAJ PLAĜO..2.000 pta
D3.- AL LA MARO! ... 1.200 pta D4.- NOKTA VALENCIO (kun vespermanĝo kaj dancado).. 6.800 pta
TUTTAGAJ(kun tagmanĝo): E1.- ARAGÓN (Teruel ,Albarracín).. 5.200 pta E2.- ORANĜFLORA MARBORDO .. 4.600 pta
POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ: P1.- MADRIDO KAJ ĈIRKAŬAĴOJ,14-18 julio...62.000 pta(74.500 unulita ĉ)
P2.- ANDALUZIO (Sevilla, Córdoba,Granada), 14-18 julio... 62.000 pta (74.500 unulita ĉ.ambro)

Por kompletigi la informojn de SFS 138 :

Pri loĝado :

- en "complejo educativo **Cheste** (21 km. de Valencio), en kvarlitaj ĉambroj por 5 tagoj: kun plena pensio :11700 p-toj, kun matenmanĝo : 6800 p-toj, nur loĝado : 6000 p-toj
- en universitataj hoteloj (kvartalo de la kongresejo)
 - en 2lita ĉambro kun pensio :18000 p-toj, kun matenmanĝo 13000 p-toj
 - en hotelo tristela :2lita ĉambro kun matenmanĝo :unu nokto :5000 p. (unulita ĉ.:6400 p.)
 - en hotelo 4stela " " 8000 " 11200
 - en hotelo 5stela : " " 10000 " 15800

Post la la de Majo, aldoniĝas 20% ; Post la la de Junio la LKK ne garantias loĝadon. Mendiloj estas haveblaj de SFS

KONCIZE (pri ricevitaĵoj)

Ankoraŭ pljbelaspektas "Esperanto-info", informilo en la franca (ĉe R.Llorens/Mice), "Asistilo" aperas regule 32paĝa (religikompara revuo,organo de Asisti (Presbytere-09800 Balagué). "Espéranto Rhône-Alpes", "sezona" bulteno de la samnoma federacio, en la franca,provizore 4paĝa (ĉe P.Lécaille BP3019 69394 Lyon Cedex 03-abono 20F) ĵus naskiĝis. Muzika laserdisko "Esperanto" estis lanĉita en Hispanio (ref 0630-17124-2) kaj la roksembleo "Persono" eldonis novan albumon "Povus esti simple", aĉetebla ĉe Vinilkosmo/Eurokka. Fine ni salutu la eldonon de informbroŝuro pri Hungario, kun multaj praktikaj informoj. Imitinde por la UK 98 (pri Francio) .



Ĝi estas asocio laŭ leĝo 1901 (vidu la Oficialan Ĵurnalon de la 1a de Majo 1996).
La kunvenoj estas ĉiumonataj.

Kreiĝis laborgrupoj, kiuj zorgas pri sekretario, kasoj (inter aliaj estis preparitaj buĝeto kaj peto de subvencioj), pri kongresejo (estas rezervitaj la salonoj de Le Corum kaj de la apuda Rabelais, kiujn ni vizitis), pri loĝado (3000 hotellitoj en Montpellier, eblecoj en studentaj loĝejoj), pri informado (pretaj : afiŝoj, glumarkoj, presdosiero, baldaŭ la Unua Bulteno -por allogi la partoprenantojn de la kongresoj dum 1997), pri turismo (proponoj jam pretaj sed dependas de surlokaj vizitoj, kontaktoj kun la diversaj turismaj oficejoj por akiri faldfoliojn, videobendojn, uzotajn dum venontaj kongresoj), pri infankongre-
-seto (loko rezervita en Sommières, distanca je 30 kilometroj de M.), pri programo (laboro laŭ indikoj de Nikola Raŝić, Konstanta Kongresa Sekretario kaj de la lastaj kongresoj), pri artaj aranĝoj (la artistoj ne mankas sed grava demando bezonus respondon : ĉu la buĝeto pri artaj aranĝoj permesas decan pagon de la artistoj?), pri komercaj rilatoj (serĉado de mecenatoj, "sponsoroj"), pri akcepto de kongresanoj (unue en Parizo, due en la Montpelieraj flughaveno kaj stacidomo), pri giĉetoj (la teamoj de tiuj du lastaj fakoj stariĝas ; ĉefe ties membroj devas esti multaj). Jen la transiro al la grava punkto de la helpantoj : Estu pretaj por proponi viajn servojn ! Ni donos al vi detalojn, venontan fojon.

J. Bony

Kompare kun la listo de la LKK-anoj, kiu aperis en la lasta SFS, okazis kelkaj ŝanĝoj. Louis Ensuque kaj Jeannine Bony rezignis respektive de la prezidanta kaj vicprezidanta postenoj. Claude Nourmont, prezidanto de UFE, akceptis la postenon de prezidanto de la LKK. Pri la artaj aranĝoj Floreal Martorell nun respondecas, anstataŭ Bernard Legeay, kiu prizorgos la programon.

En Oktobro Radio Varsovio elsendis programon en esperanto kun intervjuoj pri la UK 98 faritaj dum la UK de Prago, fakte de Jean Hénin kaj Jorgos.

Europa

La peticio, kiun vi sendis pli frue al la Eŭropa Parlamento... estas akceptebla sed ne tro esperu post la legado de la letero de la Prezidanto de la komisiono pri peticioj...

Daŭre kreskas la nombro da Eŭroparlamentanoj, kiuj subtenas esperanton. Nun ĝi atingas 100 (13 el la 15 el Irlando, 15 el la 25 el Belgio, 25 el la 87 el Britio, 18 el Italio, 10 el Francio, ktp).

Daŭre la EP disponas pri monsumoj por promocii la "lingvan diversecon"...

Diversité linguistique

Le Parlement a approuvé un programme doté de 20 millions d'euros afin de promouvoir la diversité linguistique de la Communauté dans la société de l'information. Pour le Parlement, le droit d'accéder à l'information dans sa langue doit aller de pair avec la possibilité d'accéder à l'apprentissage de plusieurs langues. Il souhaite que, dans ce programme, des actions pilotes axées sur les langues régionales et minoritaires de la Communauté soient envisagées.

EUROPA-PARLAMENTET EUROPEAN PARLIAMENT PARLAMENTO EUROPEO
EUROPÄISCHES PARLAMENT PARLAMENTO EUROPEO EUROPEES PARLEMENT
ΕΥΡΩΠΑΪΚΟ ΚΟΙΝΟΒΟΥΛΙΟ PARLEMENT EUROPEEN PARLAMENTO EUROPEU



Committee on Petitions
The Chairman

Luxembourg
mw 026942 10.IX.1996

Monsieur Raymond BORE
481 Square Zamenhof
F - 73000 CHAMBERY

Objet : Pétition n° 323/96

Monsieur,

J'ai l'honneur de vous faire savoir que la commission des pétitions a examiné votre pétition le 31 juillet 1996, et l'a déclarée recevable conformément au Traité sur l'Union européenne, dans le sens que son objet relève des domaines d'activité des Communautés européennes.

La commission des pétitions a examiné à plusieurs reprises des pétitions dont l'objet était d'inciter le Parlement européen à entreprendre une action en faveur de l'enseignement de l'espéranto. La position du Parlement européen sur l'emploi des langues et dans les institutions communautaires s'est fait connaître au cours des dernières années à travers divers rapports qu'apparemment vous avez eu l'occasion de lire puisque vous en citez des extraits dans votre pétition. Le principe retenu ne prévoit à l'heure actuelle pas une langue commune telle que l'espéranto, mais bien le "multilinguisme intégral", soit l'emploi de toutes les langues officielles et de travail de la Communauté. En outre, je vous rappelle que les programmes scolaires et l'enseignement des langues étrangères dans les écoles relèvent de la seule compétence de chaque Etat membre. D'autre part, le choix des langues à apprendre relève de la liberté individuelle.

Veuillez agréer, Monsieur, l'expression de ma considération distinguée.


E. Newman

E. NEWMAN
Président de la commission
des pétitions

TRADUKOJ kaj INTERPRETISTOJ :

Kun intereso mi legis la artikolon de R. Boré en la lasta SFS (p.11).Sajnas al mi,ke la proponitaj solvoj pri la internacia komunikado malsamas,ĉar estas konfuzo inter traduko (skribe) kaj interpretistoj (parole).




Ni konsideru la kazon de tradukoj skribe : 10 malsamaj lingvoj kun Centra Oficejo. Teksto en lingvo n° 1 estas sendita al la CO (post traduko, eble en esperanto) : 1 tradukisto. Poste 9 tradukistoj ĝin tradukos en la aliajn 9 lingvojn.Do entute 10 homoj,kiuj laboras siaritime,Serĉe oni povas imagi, ke ankaŭ iuj tradukistoj estas 3-4 lingvaj, do eble 4 tradukistoj sufiĉus.



Sed la afero estas tute alia, komplikiĝas, se temas pri tuja,sinsekva aŭ samtempa traduko. Tiam oni bezonas tre spertajn homojn kaj la CO ne povas ekzisti ! Oni devas rapidi,eĉ rapidegi.

KLARIGO DE LA FORMULO N(N-1) : N : delegitoj, N : lingvoj

La n° 1 parolas, restas N-1 aŭskultantoj, do N-1 tujaj tradukistoj necesas.



La interpretistoj estas signitaj per saĝetoj, do necesas N(N-1) interpretistoj. Se oni konsideras, ke la interpretisto de 1 al 2 povas ankaŭ funkcii de 2 al 1,ekzemple,kaj same por la aliaj, oni povas kontentiĝi per N(N-1).

Nun eniĝas homa vidpunkto : ĉu ni konfuzu² homon kun tubo por pneŭmatika depeŝo ? Evidente, 1 homo povas traduki de la itala al la germana kaj reciproke,same kiel tubo por iro k reveno. Tiel ni dividos per 2 la nombron de interpretistoj. Sed ĉu vi povas imagi tiun laboron ? Eble vi tradukis okaze de E-a prelego de eksterlandano : sinsekva (ne samtempa) traduko, eĉ kun iuj mallongigoj; estas penige, streĉe, tamen tio daŭras 1-2 horojn apenaŭ. Plie, kiam temas pri dialogo, vi devas traduki demandojn k respondojn, do senĉesa laboro.Ĉu homo povas profesie tiel daŭre labori ? Duobla laboro,duobla laceco,duobla salajro (??).

Alia punkto. Kiam temas pri altnivelaj rilatoj, estas problemo de fido aŭ malfido. Ekz : se Franca Prezidento renkontas Ĉehan Prezidenton, teorie 1 interpretisto sufiĉas N(N-1)/2= 2.(2-1)/2 = 1. Ĉu vere? ĉar ĉiu fidus je sia interpretisto ne al lia. Verŝajne eĉ aliaj laboristoj akompanas la ŝtatestrojn, kaze de malsano,akcidento...

El la 3 solvoj cititaj en la artikolo, neniu estas malĝusta sed ili respondas al diversaj kazoj :

1°) 10 lingvoj -10 tradukistoj kun CO valoras nur por skribitaj tekstoj.

2°) N(N-1)/2 : 10 x 9/2 = 45 valoras ankaŭ por tradukendaj tekstoj aŭ parole, se ni ne kalkulas pri streĉo,laceco. Fine,tro lacaj,eblas, ke la homoj eraros.

3°) N(N-1) : idala solvo,taŭga por la bona funkciado de tradukado.

Ĉu ni ne konsideru la homajn faktorojn ? Oni ne "povos vin vole ŝveligi la nombron", se vi klarigos la kialon de via kalkulo.

S.Authier

Lingvoj,lingvoj :

Antaŭ kelkaj semajnoj koliziis du aviadiloj super Hindio (Bharato). Laŭdire la skipo el Kazakio ne bone komprenis la instrukciojn de la kontrolistoj...en la angla. Pereis 350 homoj...


S-ro Bayrou, nia Ministro pri Edukado, reenkondukis la latinan por kvarono de la kolegianoj. Li ankaŭ intencas malgrandigi la nombron da instruhoroj de la unua lingvo (kutime la angla). S-ro Ferrari, nova Rektoro de la Akademio de Montpellier, volas subteni la instruadon de la lingvoj, kiuj utilas por rilati kun niaj najbaroj, do de la itala (eble li forgesis,ke li ne plu estas en la Akademio de Nico) kaj la hispana (eble li ne scias, ke niaj najbaroj parolas ...la katalunan)...

En Alĝerio oni decidis,ke la araba estos la sola oficiala lingvo (kio pri la berbera kaj la Franca?)... En Niĝerio,la "giganto de Afriko",eble la franca lingvo anstataŭos...la anglan. Esperanto ne povos esti la lingvo de Eŭropo. Tio aŭdiĝis sur "France Inter",kiu ricevis multajn mesaĝojn de la esperantistoj kaj asertis,ke tiun rolon povas ludi...nur nacia lingvo. sed kiu??? Ne gravas, se la franca ne estos elektata. Laŭ "Ipsos",firmo,kiu fakas pri opini-sondado,la gefrancoj estas la plej bonaj Eŭropanoj, ĉar 61% el ili bone parolas duan lingvon. Ni timu nenion, se la Eŭropa Unio akceptos novajn membrojn !

J.H.

DISTRA PAĜO

KRUCVORTOJ



HORIZONTALE

- I) Ĝentilaj(o).
 II) Komputist(o).
 III) Lacert(o) / Balkana litero.
 IV) Kreint(o) de ia Terismo / Dolora afikso.
 V) Ne tute plene / Flugiluj(o).
 VI) Ĉu gaja scienco ?
 VII) Azian(o) / s : Dio por ekkrio.
 VIII) s : Grupo / Sur azia sceno / s : Marĉolilio.
 IX) Seminta do.
 X) Kiel kolonoj / s : Pastro.

VERIKALE

- 1) "Dormiga" preĝ(o).
 2) La korpo-kuracisto.
 3) Grandaj ŝatataj fruktoj / s : Sperto.
 4) Frat(o) de Lanti / Iu ajn iel ajn.
 5) Servaĉ(i) / Oju do.
 6) Litomezo / Rabobest(o) / Orela, por kelkaj.
 7) Neuzitaj fajrohundoj / Dolora krio.
 8) Fine de cirkulero / Granda rampul(o).
 9) Simi(o) / Por fini sen fini.
 10) Kia surpriz(o) !

s : sone

BOPARO.

Solvoj de la 138-a

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	F	R	U	K	T	I	D	O	R	O
II	O	■	P	R	O	V	I	Z	O	R
III	S	T	A	K	T	■	L	I	M	A
IV	F	■	N	A	S	K	■	R	A	N
V	O	G	I	V	■	K	L	I	N	G
VI	R	U	Ŝ	■	A	S	I	S	T	U
VII	E	V	A	K	U	■	K	O	I	T
VIII	S	E	D	A	T	I	V	■	K	A
IX	K	R	O	N	■	V	I	K	U	N
X	A	N	J	■	I	N	D	U	L	G

Intermiksitaj proverboj

Bernard Golden

Tiu ĉi kvizo konsistas el 25 konataj Esperantaj proverboj, kies unuaj kaj lastaj partoj estas intermiksitaj. Post tralegado de ĉiuj 25 eroj, provu kunmeti la partojn, kiuj formas la verajn proverbojn. Jen ekzemplo:

- A. Plej bone ridas, kiam boto nin premas.
 B. Najbaro ne ĝemas, kiu laste ridas.

Estas evidente, ke la du senc-havaj proverboj estas:

- A. Plej bone ridas, kiu laste ridas.
 B. Najbaro ne ĝemas, kiam boto nin premas.

1. Ne ŝovu la nazon tie fajro troviĝas.
2. De tro multa scio estas plej bongusto.
3. Kiu rompis la glason, li tutan manon postulas.
4. Hundo bojas, kiu neniam ion faras.
5. Hako post hako disfalas granito.
6. Nur tiu ne eraras, — buŝo parolas.
7. Kie fumo levigaas, homo vojas.
8. De guto post guto kreas la kranio.
9. Kie diablo ne povas, ankaŭ ombro troviĝas.
10. Ofte ĉapo de kampulo ne estas sur la hoko.
11. Se okulo ne vidas, herbo ne kovras.
12. Kiu volas mensogi, ordigu la kason.
13. Vivo sen modero estas la plej efika atako.
14. Nokte eĉ monstro ne bezonas jam ĉapon.
15. Vojon batitan koro ne avidas.
16. Nova balailo kovras kapon de saĝulo.
17. Gasto kaj fiŝo bone veturas.
18. Frukto malpermesita baldaŭ fariĝas malfreŝa.
19. Koro tro plena kondukas al mizero.
20. Donu fingron al avidulo, kiam dentoj elfalis.
21. Kiu bone ŝmiras, estas belulo.
22. Kiu perdis la kapon devas bone memori.
23. Nuksoj venis en fremdan vazon.
24. Kie lumo ekzistas, tien li sendas virinon.
25. Ankoraŭ la ezoko bone balaas.



12 ☺☺ JUNA AMIKO 96/3-4

*E/ "Receptareto
 por frandemuloj"
 eldonita de JEFO*

Por 4 personoj
 Preparado: 5 mn
 Kuirado: 10 mn

120 g da nigra ĉokolado.
 1/2 l da lakto,
 3 ovoŝlavo.
 1 glaso da sukera siropo.
 1 tekulero da vanilekstrakto

Ĉokoladlakto laŭ malnova modo

- 1 En mezgranda kaserolo fandu sur malforta fajro la pecigitan ĉokoladon kun iom da lakto. Kiam ĝi estas fandita kaj glata, solvu ĝin per la resto de la lakto kaj lasu surfajre.
- 2 En pelvo kirlu la ovoŝlavojn, aldonu la vanilon kaj la sukeran siropo. Vigle kirlomixu ĝis heliĝo de la preparajo.
- 3 Malrapide surverŝu la varman ĉokoladon zorge mikante la tuton.
- 4 Remetu en la kaserolon kaj varmigu sur malforta fajro senĉese kirlante ĝis densiĝo kaj ŝaumigo de la miksaĵo sen boligi ĝin.
- 5 Verŝu tuj en glasojn kaj surtabligu.
Estas malnova recepto, kiun oni preparas lastmomente kaj frandas tre varma en grandaj porcelanaj kajglasoj.

SFS 140 aperos fine de Aprilo
 Sendu viajn kontribuojn antaŭ
la 10a de Aprilo
 al J. Hénin /Rte de Montcayroux
 48500 La Canourgue
 Tel/Fax : 04 66 32 86 36
 Anticipan dankon !